



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

N-ro 21/1973 25 sep 1973  
Aperas ĉiusemajne

Informado kostas  
monon!

Abonu kaj subtenu

Pilo-Press

Ludwig Pickel

85 Nürnberg 1

PSchK Nürnberg 819

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (0911) 46 36 49; 5142 69  
56-851

### Aŭdienco ĉe Federacia Prezidento Heinemann

Bonn (pp/GEA) Laŭ invito de la Prezidento de Federacia Respubliko Germanio, d-ro Gustav Heinemann, kvarpersona delegacio de la estraro de Germana Esperanto-Asocio sub gvido de ĝia prezidanto, d-ro Werner Bormann, havis aŭdiencon en la prezidenta palaco en Bonn la 21-an de septembro 1973. La Federacia Prezidento vigle interesiĝis pri la disvastiĝinteco de Esperanto, ĉefe en la t.n. tria mondo, estis impresita pro la kontaktebloj disponigataj per la Internacia Lingvo, informiĝis pri la aktivadoj inter la junularoj kaj ĝojis pri la bona evoluo. Li pli detale preparolis kun la delegacianoj la konkurenconproblemon angla/Esperanto kaj demandis, kiuj estus la decidaj paŝoj momente imageblaj por atingi rimarkeblan sukceson por Esperanto.

Je la fino de la duonhora interparolado la Prezidento sincere dankis, ke li nun eksciis tiom da interesaj facetoj en afero ĝis tiam al li ne pli detale konata.

La GEA-delegacion konsistigis krom d-ro W. Bormann la estraranoj Heinrich Nischwitz, Helmut Klünder, prezidanto de Germana Esperanto-Junularo, kaj s-ino Elsbeth Bormann.

\*\*\*\*\*

### ELI-Delegacio ĉe israela Ŝtatprezidento

Tel-Aviv (pp/HdE) Komence de septembro 1973 la israela Prezidento, Salman Schasar, akceptis delegacion de Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) kaj esprimis sian simpatian por Esperanto. Dum la interparolado la israela Prezidento konfesis, ke li kiel knabo lernis Esperanton. Lia patro estis agema esperantisto.

\*\*\*\*\*

### Esperanto en Irako

Bagdad (pp) Antaŭ kelkaj monatoj aperis en irakaj gazetoj kelkaj artikoloj kaj informoj pri Esperanto, kiuj vekis iometan interesiĝon pri la araba lernolibro por Esperanto. En Irako ekzistas kelkaj individuaj esperantistoj, i.a. studentoj en Bagdad kaj en Basrah. La plej konata iraka esperantisto estas Husen Mohamed Al-Amily, UEA-delegito en Bagdad. Verŝajne baldaŭ aperos prospekto en Esperanto de oficialaj turismaj instancoj. En irakaj gazetoj oni volas reklami la E-lernolibron por arablingvanoj kaj poŝvortaron de Nassif.

Pilo-Press eksciis, ke iraka esperantisto intencas partopreni la Universalan Kongreson en Hamburg 1974.

Interesa kaj fruktodona interparolo

Bonn (pp/GEA) Antaŭ la aŭdienco ĉe la Federacia Prezidento la kvar-persona delegacio de GEA sub gvido de d-ro Werner Bormann vizitis la Ministerion pri Edukado kaj Scienco en Bonn, kiu laŭ decido de la registaro estas la afergvidanta institucio en Esperanto-aferoj en la Federacia Registaro. Okazis tre interesa kaj fruktodona interparolo kun la departementestro Ministerialrat Dr. Rommel kaj la prilaboranta de la fako, Esperanto, Oberamtsrat Leibl.

Tiu departemento en la edukministerio ĝenerale respondecas pri lernejoj model-eksperimentoj. Do, Esperanto jam lokigita tie havas bonajn ŝancojn esti progresigita de tie, kie la ministerianoj eĉ estas sincere bonvolaj.

En la interparolado estis certigite, ke la federacia ministro von Dohnany, ĉefo de tiu ministerio, estas la alta patrono de la 59-a Universala Kongreso de Esperanto 1974 en Hamburgo.

Sukcesa Esperanto-instruado Aller Anfang ist leicht ...

Schwabmuenchen (PP)

# Esperanto an der Gesamtschule

Im nächsten Schuljahr als Wahlfach vorgesehen – Erster Kurs gut besucht

Pilo-Press en sia numero 11/73 jam raportis pri la sukcesa Esperanto-instruado fare de Gerald Tucker en la integra lernejo de Schwabmuenchen. Apude ni publikigas la eltranĉaĵon el Schwabmuenchner Allgemeine de la 4.8.73 kun raportado pri la E-instruado kaj la ekzameno. Krome okazis provleciono, kiun partoprenis Oberamtsrat Leibl kiel komisiito de la Ministerio pri Eduko kaj Scienco. La ministeria komisiito konvinkigis pri la facila kaj rapida ellernebleco de Esperanto kaj deklaris, ke li bonvenigus pli konkretajn rezultojn de la eksperimentoj de Schwabmuenchen jam en la venonta jaro.

Schwabmünchen (B). Das Schuljahr 972/73 ist zu Ende, Lehrern und Schülern wird eine wohlverdiente Ruhepause geöffnet. Der vorgeschriebene Lehrstoff wurde erarbeitet, und alle Beteiligten können aufatmen. Um so erstaunlicher ist es, wie viele Buben und Mädchen der Gesamtschule trotz des anstrengenden Pflichtunterrichts freiwillig auch noch Neigungskurse besuchen.

Eine der zahlreichen Wahlmöglichkeiten bot die internationale Sprache Esperanto. Von etwa 60 Interessenten besuchten 46 Schülerinnen und Schüler regelmäßig den Unterricht und unterzogen sich vor Beginn der Sommerferien der Kursabschlussprüfung des deutschen Esperanto-Instituts. Der Kurs stand unter der Leitung des Fachlehrers für Englisch an der Gesamtschule, Gerald Tucker. Der gebürtige Amerikaner ist Fachleiter für das Prüfungswesen des deutschen Esperanto-Instituts.

Im Beisein des Schulleiters, Studiendirektor Hans Emmer, konnten 44 Kursteilnehmer als Anerkennung für ihre Bemühungen ein Zeugnis in Empfang nehmen. Außerdem erhielt jeder Schüler zum Schulzeugnis eine schriftliche Bestätigung der Teilnahme an diesem Neigungskurs mit einer Aussage über den Grad des Erfolges. Den zehn Besten überreichte der Kursleiter je ein Exemplar des von ihm aus dem Englischen in Esperanto übersetzten Werkes von George

Orwel „The Animal Farm“ (La Besto-Farmo).

Bei einer Probelektion kurz vor Ende des Schuljahres hatten die jungen Kursteilnehmer Gelegenheit, ihr Können im Beisein von Oberamtsrat Leibl vom Bundesministerium für Bildung und Wissenschaft, Verwaltungsamtmann Henke von der Stadtverwaltung und Schulleiter Studienrat Hans Emmer unter Beweis zu stellen. Der Gast aus Bonn, zugleich Beauftragter für Esperanto im Ministerium, fand dabei die leichte und schnelle Erlernbarkeit dieser Sprache bestätigt. Er würde es, wie er betonte, begrüßen, wenn im kommenden Jahr schon konkretere Ergebnisse der Schwabmünchner Versuche vorgelegt werden könnten.

Der Esperanto-Weltkongress findet 1974 in Hamburg unter der Schirmherrschaft von Bundeswissenschaftsminister Claus von Dohnanyi statt. Im Rahmen dieser internationalen Veranstaltung wird auch ein Kinderkongress abgehalten. Daran sollen, einer Anregung von Kursleiter Tucker folgend, auch die Besten des Esperantounterrichts an der Schwabmünchner Gesamtschule im nächsten Jahr teilnehmen. Vorgesehen ist ferner, Esperanto als Wahlfach im kommenden Schuljahr einzuführen. Dazu ist die Ausbildung von weiteren Lehrkräften erforderlich. Mehrere Lehrer der Gesamtschule haben sich schon bereit erklärt, an einem solchen Lehrgang teilzunehmen.

Jus Pilo-Press eksciis, ke ekde la lernejo-jaro 1973/74 en la horaro estas oficiale inkluzivitaj 4 1/2 horoj por inklingrupoj Esperanto, kiuj apartenas al la regula deviga horkvanto de fakinstruisto Gerald Tucker, kiu denove gvidas la E-kurson.

+++++

Abonprezo de Pilo-Press

Pro la altaj afrankokostoj la abonprezo de Pilo-Press devos esti plialtigita ekde la 1 jan 1974. La nova tarifo estas: 30 GM por la E-a eldono, 15 GM por la germana Eldono 40 GM por ambaŭ eldonoj.

### Konversacio ĉe surprize bona aŭstralia vino

Bonn (pp/hn) La aŭstralia ambasadoro en Bonn, Lia Samideana Moŝto Ralph Harry, invitis la kvarpersonan GEA-delegacion, kiu estis akceptita de Prezidento Heinemann je la 21 sep 73, posttagmeze de la sama tago en sian rezidejon al lundo. Ĉe senĝena babilado kaj serioza konversacio, sed ankaŭ ĉe unuaklasa menuo kaj surprize bona aŭstralia vino pasis agrablaj horoj en la ĉarma rezideja vilao, tra kies larĝaj fenestroj la rigardo iras malsupren al la Rejno kun vigla ŝiptrafiko kaj transen al Petersberg kun la fama hotelo.

### 44a Itala Esperanto-Kongreso en Trento

Trento(pp) De la 15 - 22 sep 1973 okazis en la urbo Trento la 44 Itala Kongreso de Esperanto kun 250 partoprenantoj el Italio, Aŭstrio, Britio, Danlando, Francio, FRG, Grekujo, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Novzelando, Pollando kaj Rumanio. La inaŭguron ĉeestis reprezentanto de la itala registaro, Senatoro Alberto Del Nero, vicministro pri laboro kaj socialaj aferoj, kiu direktis al la kongreso tre favorajn salutvortojn. Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de la pola ambasado en Italio. La gazetaro tre detale raportis pri la kongreso. Pilo-Press denove raportas pri tiu kongreso en sia venonta eldono.



Un momento dei lavori aperti ieri mattina in Regione

(foto Pederzoli)

\*\*\*\*\*

### Esperanto en aŭstria televido

Vieno (pp/aem) Laŭ instigo de Aŭstria Esperanto-Movado teamo de la aŭstria televido (ORF-FS) vizitis la 23 aŭg 1973 la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno, por tie filmi scenojn por la televida serio "BILDUNG-KURZ-AKTUELL" (Klerigo-mallonga-aktuala).

Post salutado en Esperanto sekvas informoj pri la gramatiko de Esperanto kaj pri la ekspozici-materiale de Internacia Esperanto-Muzeo. Je la fino de la prezentado oni diras kelkajn frazojn pri la celo kaj stato de la Esperanto-movado.

Laŭvice parolas: Anton Oberndorfer, Wels, afergvida prezidanto de Aŭstria Esperanto-Junularo, Herbert März, Vieno, funkciulo de Aŭstria Esperanto-Movado, d-ro Walter Hube, Vieno, direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo, fine denove A. Oberndorfer.

La programon disvidigos la Dua Programo de la aŭstria televido (ORF-FS 2), marde la 16an de oktobro 1973, de 20,09 ĝis 20,15 horo

\*\*\*\*\*

Radio Bervalio ĉifoje silentas pro la amaso de aktualaj informoj!

Homoj kaj Nomoj

kun kaj sen renomoj

Heinrich Nischwitz, Bensheim, GEA-estrarano pri financoj kaj membro de Bonn'a delegacio, nomis la 21an de septembro 1973 "enhavoriĉa tago." kaj komentis jene: "Ni esperu, ke la prezentado de Esperanto, ĝiaj celoj kaj ĝia movado al la plej alta reprezentanto de nia ŝtato kaj al la kompetentaj ministeriaj referentoj portos daŭrajn fruktojn. Estas nun nia vico, zorge flegi la kontaktojn kaj utiligi la favoron de la horo."

Prof. d-ro Ivo Lapenna, prezidanto de UEA, laŭ informo de Radio Romo partoprenis la postkongreson en Ateno, kaj komence de septembro restadis en Romo, kie li ĉeestis Esperanto-meson kaj kunvenon de esperantistoj sub la bildo dela "Madono de la Espero".

Rudi Graetz, Berlino (DDR), post reveno de la Beograda kongreso estis intervjuita kiel prezidanto de la Laborrondo Esperanto en GDR de la redakcio de NBI (Neue Berliner Illustrierte) pri la ŝancoj de Esperanto. Sekve de tiu intervjuo aperis en la dua septembra numero de tiu revuo dupaĝa ilustrita raporto pri Esperanto, cetero tre objektiva kaj pozitiva.

Georg Chr. Sack, Heidelberg, leganto de Pilo-Press, partoprenis la 44an Italan Esperanto-Kongreson kaj sendis salutkarton, kiu portas porokazan poŝtstampon kun E-taksto. S-ro Sack ankaŭ sendis raporton pri la kongreso kun gazeteltranĉaĵoj, pro kio Pilo-Press kore dankas.

Bertil Englund, sveda muzikisto el Malmö, nuntempe ludas en orkestro gastiganta en Norderney, FRG.

Max Wazlawek, Dinslaken, leganto de Pilo-Press, sendis "salutojn el la bela urbo Dresden" kaj la eltranĉaĵon el "Neue Berliner Illustrierte" kun la ilustrita Esperanto-artikolo.

Dr. A. Baur, Esperanto-parolisto ĉe Radio Bern, en sia Esperanto-elsendo de la 24 sep 73 nomis Pilo-Press-on la plej bona Esperanto-informservo, kiu iam aperis. Dum la 4-monata neapero oni sentis ĝian mankon. (Laŭsenca citaĵo)

\*\*\*\*\*

La semajno en la radio (pp)

Radio Bern en sia elsendo de la 24 sep 73 agrable surprizigis la redaktoron de Pilo-Press. D-ro A. Baur prezentis mallongigitan version de la "Taglibro de radio-aŭskultanto" kun momentaj impresoj pri la 58-a UK en Beograd. Je la fino li menciis, ke la svisa radio en sia informservo raportis pri la malfermo kaj fermo de UK en Beograd kaj la mezonda radiostacio (enlanda) prezentis pri kongresan programon de A. Baur. Merkrede s-ro Gacond intervjuis E-verkiston pri eldonado de E-libroj. - El la programo de Radio Pekino ĉi-foje elstaris la oficiala komunikilo pri la vizito de Prezidento Pompidou en Ĉinio. - Radio Romo ĉi-foje bedaŭrinde denove ne estis kaptebla, pasintan semajnon jes. La programoj de la 5a, 12a kaj 19a de aŭg. ne estis aŭdeblaj, ĉar la teknikistoj strikis. Sed nun la afero denove marŝas, informis d-ro A. De Salvo. - Varsovio: El la politikaj programoj menciindas speciale la komentario pri la aliĝo de la du germanaj ŝtatoj al UNO. En la ĉiutaga radio-ĵurnalo pli kaj pli ofte estas raportata pri Esperanto-aferoj, pri apero de E-eldonaĵoj, ekz. vortaro Pola-Esperanta en 5000 ekz. aŭ la fakto, ke pri la Beograda UK aperis 38 mencioj kaj informoj en polaj gazetoj kaj en radio/televido. En la E-ekspreso aperis nova rubriko "Novaĵoj pri la venonta UK en Hamburg". Populara programo estas la koncerto kun bondeziroj. Kial ne germanaj aŭskultantoj pli ofte utiligas tiun servon?